Heinrich Heine,

# La mesaĝo

*tradukita de Manfredo Ratislavo*

Servisto, tuj ekstaru vi
Kaj sur la dorso de l'
Ĉeval' rapidu tra l' kampar'
Al reĝa la kastel'.

Atendu tie je l' servist'
De l' stal'! Demandu lin,
Ĉu la filino de la reĝ'
Jam estas fianĉin'.

Se diros la stalbubo: „Ne!“,
Returnu tuj al mi.
Sed se la bubo diros: „Jes!“,
Ne devas hasti vi.

Vi iru al la ŝnurfarist',
Aĉetu ŝnuron vi,
Senvorte rajdu sur la voj',
Alportu ĝin al mi.

*Traduko de la Germana poemo "Die Botschaft" de* HEINRICH HEINE *(∗1797-12-13 – †1856-02-17) en Esperanton de* MANFREDO RATISLAVO *(Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, ∗1938-11-04) en 1984.*

*MR-117-1 / Arg-207-414 (2004-03-12 23:53:32)*